

FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA
kaj de PATRONA ASOCIO "LEXICON SILVESTRE" R.A.

No. 61 Eberswalde, 2011-10-15

(Esperanto-versio)

Ingward Ullrich

– fervora batalanto por Esperanto – fariĝas 80 jarojn!

de Clivia Panka



S-ro Ingward Ullrich – unu el la plej meritaj kaj plej aktivaj esperantistoj de nia Patrona Asocio – en tiu ĉi jaro solenas la 80an datevenon de sia naskiĝtago. Tio motivigas nin, retrorigardi al la impresa vivo de tiu eksterordinara, multflanke interesiĝanta kaj ĝis nun senlace aktiva homo, kolego kaj amiko. Tiamaniere ni ŝatas montri al li nian profundan estimon.

Ingward Ullrich naskiĝis je la 29a de septembro 1931 en vilaĝo Reichmannsdorf, situanta en la belpejzaĝa Turingia Montaro. Ĉi tie la familio de la patrino estis setlinta. La patraj prauloj – kamparanoj kaj muzikantoj – devenas el vilaĝo Veilsdorf ĉe rivero Werra en la

limregiono Frankonio – suda Turingio.

Ingward estas la ununura infano de Alfred kaj Anna Ullrich. La patro laboris de 1933 ĝis 1939 kiel domzorgisto en infanripoza hejmo, situanta meze de vastaj arbaroj proksime de vilaĝo Meura. La arbaro fariĝis al intima ĉirkaŭo de la juna knabo. Ekestis la unuaj ankoraŭ tre infan-revaj ideoj, fariĝi arbargardisto – kiel iam la praavo – aŭ eĉ arbaristo.

1938 kaj 1939 Ingward frekventis la popolan lernejon en Meura, poste ĝis 1945 en Veilsdorf kaj Hildburghausen. En la jaro 1940 la nazi-administracio devigis la patron al laboro en armil-produktanta uzino en Hildburghausen. Tio sekvigis transloĝiĝon de la familio, unue al Veilsdorf kaj du jarojn poste al urbo Hildburghausen, kiu de tiam ĝis nuntempe fariĝis la nova hejmloko. Certe instigita de la patro, kiu kapablis ludi kelkajn muzikinstrumentojn, Ingward ekde sia 12a jaro komencis la muzikadon sur la violono. Post la finiĝo de la baza lerneja instruo li frekventis la gimnazium "Geschwister Scholl" (Gefratoj Scholl) en Hildburghausen. 1950 li pasigis la abiturientan ekzamenon. Li firme decidiĝis, komenci la profesion de forstisto.

Por atingi tiun celon, Ingward unue faris edukon kiel forsta faklaboristo en la Prusa Forstkanton-administracio Schleusingen (iama prusa eksklavo) kaj en la Turingia Forstkanton-administracio Troststadt. En la jaro 1952 li komencis studadon de forstaj sciencoj en la Forsta Fakultato Eberswalde de Humboldt-Universitato Berlino. 1956 li sukcese finis la studadon per ekzameno al diplomita forstisto kaj tre ampleksa diplomlaboraĵo sub la patroneco de prof. d-ro W. Kruel pri la temo *Sinoptika klasifiko de ĉiuj insektospecioj de Mezeŭropo, uzantaj Poplon kaj Salikon kiel nutraĵa bazo*. Malgraŭ la postuloj de la studado, la multflanke interesiĝanta juna viro ankoraŭ trovis tempon frekventi kursojn pri muzikteorio en la popola muziklernejo Eberswalde kaj fondi studentan arĉinstrumentan kvarteton, kiu estis ŝatata de la publiko.

La restado de Ingward en Eberswalde ankaŭ aliarilate fariĝis de vivodestina graveco. Ĉi tie li konatiĝis kun fraŭlino Ruth Blankenburg, al kiu li ankoraŭ en 1956 edziĝis. Multaj komunaj jaroj troviĝis antaŭ la geedza paro – kaj estonte montriĝu, ke ĝi vere pretas, kune porti ĝojon kaj triston. Jam en la sama jaro la filino Gabriele naskiĝis, unu jaro poste la filo Bernd. La dua filo Dietmar (* 1959) mortis 1966 sekve de tragika akcidento dum liberaera banado. *"Dolorplena perdo ĝis nia nuntempa vivo"*, diras Ingward Ullrich. La plej juna filo Fred Julien, la "kokideto", naskiĝis 1971. Li parte sekvis la spurojn de la patro kaj elektis la muzikon kiel profesion. Li studis en la ĉefaj fakoj violono kaj aldivolono. Kiam la familianoj kunvenas, kvar nepoj kaj kvar pranepoj ĝojigas la koron le la jubileulo.

Sed antaŭ ol Ingward povis ĝui la ĝojon de avo kaj praavo, li devis iri longan laborintensan profesion vojon. Post la studado li unue agis kiel adjunkto entreprena (referendaro) en Ŝtata Forstentrepreno Neubrandenburg. 1958 li sukcesis reveni al sia amata Turingio. Ĝis 1985 li estis okupita ĉe la Turingia Forstaranĝa Buroo en Weimar kiel forstaranĝisto, ekde 1963 en gvida pozicio. 1966 li estis nomumita Forstmajstro. Dum la lastaj kvar jaroj antaŭ la drasta ŝanĝiĝo de la politika kaj ŝtata sistemo en la GDR¹ li estis referento pri forstprotektado en Ŝtata Forstentrepreno Hildburghausen.

En la jaro de la politika kaj ŝtata ŝanĝiĝoj 1990 Ingward Ullrich tre entuziasme agadis por la demokratia transformado de la forstmastrumado en Turingio. Li estis kunfondinto de *Verda Forumo de Turingio* kaj en *Forsta Komitato Turingio* estro de la laborgrupo "Forsta Administracia Strukturo en Turingio". Same 1990 li engaĝis sin por la fondiĝo de *Turingia Forsta Asocio r.a.*, kiu honoris lin en la jaro 2000 per la arĝenta medalo "Gottlob König" pro eksterordinaraj meritoj. En la unuaj du jaroj post la politika ŝanĝiĝo li okupis la oficon de sekciestro pri Silvikulturo kaj Arbarprotektado en la nove instalita Forstprovinc-administracio Turingio. Aŭtune 1992 li antaŭtempe emeritiĝis.

Sed tio ne signifas, ke la multflanka kaj senlaca geniulo retiriĝis de laboro. Dum ĉiuj jaroj s-ro Ullrich estis fidela al la muziko. Ĝi donis kaj donas al li forton dum afliktaj tempoj kaj pliiintensigas la feliĉon de gajaj momentoj de la vivo. En la jaro 1991 li estis unu el la kunfondintoj de *Muzika Asocio Hildburghausen r.a.*, en kiu li plenumis meritplene diversajn funkciojn ĝis 2001. Ankaŭ Chambro-orkestro *Collegium musicum* ekestis 1996 laŭ lia kuniniciato. Ĝis hodiaŭ nia grandaĝa amiko kaj kolego ludas la aldviolonon en tiu orkestro.

Sed kiam kaj kiel Esperanto aperis en la vivo de Ingward Ullrich? Estis en la jaro 1967. Li mem parolu pri tio: "*En librovendejo mi hazarde trovis libron 'Wir lernen Esperanto sprechen'*"². *Ĉar mi de ĉiam interesiĝis pri lingvoj, mi aĉetis la libron. Mi estis scivola, ĉu 'artefarita' lingvo en ĉiuj vivosferoj bone kaj plenvalore funkcias. Mi lernis dum mallonga tempo la gramatikon, vortfaradon kaj por la komenco la fundamentan vortmaterialon (kaj iomete la strukturon de la lingvo). Baldaŭ mi korespondis mondvaste, studis la esperantigitan literaturon (Goethe – 'Fausto', Schiller: 'La Rabistoj', Sienkiewicz: 'Quo vadis', Alighieri: 'Dia Komedio', Apitz: 'Nuda inter lupoj' kaj aliaj), mem provis traduki kaj verki prozon kaj lirikon (3a premio en Internacia Literatura Konkurso de revuo 'Bulgara Esperantisto' 1979), por eltrovi la taŭgecon ankaŭ sur tiu ĉi kampo". Al beletro baldaŭ aliĝis tradukoj de faka literaturo. La fascino de la kreaĵo de Zamenhof kaptis lin por ĉiam. Partoprenante diversajn mondkongresojn de UEA, li ĉiam denove povis konstati: Kia grandioza atmosfero sen tradukistoj interkomuniĝi kun homoj el multaj landoj! Lia verdikto estas jene: "Nuntempe mi povas diri: Esperanto estas taŭga por komunikado en ĉiuj vivosferoj, de plej karesa amdeklaro ĝis komplikaj fakaj tekstoj. Ĝi evoluis dum la 125 jaroj post la kreado tute same kiel nacia lingvo".*

En la jaro 1982 nia unika d-ro Karl-Hermann Simon povis akiri s-ron Ullrich kiel kunlaboranton pri la Lexicon-projekto. De tiam ĝis la morto de d-ro Simon intima amikeco interligis la du favorajn esperantistojn, kiu ankaŭ inkluzivis ambaŭ familiojn. Fruktozona intensa kunlaboro akcelis la projekton *Lexicon silvestre*. Komence longaj diskutoj okazis pri la fina celo de la verkado: Sistemigo de la nocioj, unusignifeco kaj konziceco de terminoj. Difinoj estis ellaborataj, la definitivaj terminoj estis fiksataj kaj elprovataj en memverkitaj kaj tradukitaj fakaj artikoloj. Kune s-ro Ullrich kaj d-ro Simon klopodis klarigi ankaŭ al ampleksa publiko la ideon pri *Lexicon silvestre*.

Por akceli la terminologian laboron pri *Ls*, s-ro Ullrich 1983 proponis instali la Terminologian Komisionon de IFRE³ (TKI), kiun li ĝis nun estras. Krome li estis Adjunkto Scienca (Asci) de AIS⁴ de 1990 ĝis 1993.

S-ro Ullrich povas referenci al longa listo da publikaĵoj, kiun ni suplemente prezentas. Lia plej ampleksa kaj grava verko estas la kvinlingva (scienc-latina, Esperanta, germana, angla, franca) *Nomenclatura florae lignae silvestris Europae (Nomenklatur de la forsta ligneca flaŭro de Eŭropo)*. Sed antaŭ ĉio ni tre dankas, ke li povis – malgraŭ grandaĝo kaj kaŭzoj de

¹ Germana Demokratia Respubliko

² „Ni lernas paroli Esperanton“

³ Internacia Forstista Rondo Esperantlingva

⁴ Akademio Internacia de San Marino

malbona saneco – finpretigi la naŭan Esperantan volumon de *Lexicon silvestre*. Neniu alia ol li estintus kapabla plenumi tiun sizifan laboron.

Ni tutkore deziras al s-ro Ullrich bonan sanon kaj pluan vivon plena de krea forto, por ke li povu realigi ĉi tiujn ideojn, kiuj ne ripozigas lin.

Publikaĵoj kaj traktaĵoj de Ingward Ullrich

1 Forstfakaj publikaĵoj kaj traktaĵoj

1.1 Forstfakaj publikaĵoj kaj traktaĵoj ĝenerale

La forstaranĝo en la Germana Demokratia Respubliko. (Die Forsteinrichtung in der DDR). 1984, skribmaŝine/Schreibmaschine, 42 p., nepublikigita/unveröff.

Pri acidiĝo en Skandinavio (Zur Versäuerung in Skandinavien). Tutmontaj Sciencoj kaj Teknikoj (TST), 3/1986, Pekino, p. 9-12. (Auch ins Chinesische übersetzt). **Mitautor:** J. A. Pachter

Espero por arbaro. (Hoffnung für den Wald). Monato, 7/1986, Antwerpen, p. 16-17. (Erschienen unter dem Pseudonym I.R.)

El turingiaj forstkronikoj. (Aus thüringischen Forstchroniken). Forstista Informilo (FI) 18/1988, Eberswalde

La arbara fonduso en la Germana Demokratia Respubliko. (Der Waldfonds in der DDR). TST, 2/1988, Pekino, p. 9-12. (Auch ins Chinesische übersetzt)

Die neuartigen Waldschäden, Schadenssituation, Ursachen und Gegenmaßnahmen. 1990, unveröff. Manuskript. Vortrag vor Biologielehrern der Hildburghäuser Schulen

Grundsätzliche Erneuerung in allen Bereichen der Forstwirtschaft ist notwendig. Forstwirtschaft, 4/1990, Berlin. p. 102-103. **Mitautor:** Hoffmann, J.

Ekologia kontrolo de la arbara sanstato rilate novspecajn arbardifektojn kaj rezultoj en Germana Demokratia Respubliko. Prelego, farita en Bjalistoko 1990 okaze de la 8a Sennacieca Universitata Sesio (SUS 8) de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino kadre de la prelegserio „Ekologio kaj protektado de la natura medio“. (Ökologische Waldzustandskontrolle bezüglich neuartiger Waldschäden und Ergebnisse in der DDR. Vorlesung in Białystok anlässlich der 8. Sommeruniversität der Internationalen Akademie der Wissenschaften (AIS) San Marino im Rahmen der Vorlesungsreihe „Ökologie und Umweltschutz“). Manuskripto/Manuskript skribmaŝ./Schreibmasch. 14 p.

Wald im Grenzstreifen zwischen Eisfeld und Mellrichstadt. AFZ, 6/1991, p. 282-283, Stuttgart

Burgen und Wald im südthüringisch-fränkischen Keuperland. AFZ, 6/1991, p. 316-318, Stuttgart. **Mitautor:** Hoffmann, J.

La dimensio de novspecaj arbardifektoj en Turingio. (Das Ausmaß neuartiger Waldschäden in Thüringen). FI 28/1993, Eberswalde. (Auch ins Deutsche und Englische übersetzt)

Silvikulturaj principoj ĉe la mastrumado de imisie-ŝarĝitaj starejoj de la Turingia Montaro. (Waldbauliche Prinzipien bei der Bewirtschaftung immissions-belasteter Standorte des Thüringer Gebirges.) Prelego okaze de IFRE – aranĝo en Eberswalde je la 7-a de okt. 1994. (Vorlesung anlässlich der IFRE – Veranstaltung in Eberswalde am 7. Okt. 1994). Manuskripto 10 p.

1.2 Publikaĵoj pri forstfaka terminologio

Lexicon silvestre. Vortaro de forsta fako. (Wörterbuch des Forstwesens). Kunaŭtoro (Mitautor). Gvidanto/Leiter: Dr. Simon, K.-H. Förderverein „Lexicon silvestre“ e.V., 1992 ff., Eberswalde

Kelkaj pensoj pri nia terminologia laboro. (Einige Gedanken über unsere terminologische Arbeit.) FI 3/83, Eberswalde

- Ekspertizo pri la forsta kaj ĉasa fakvortaro de d-ro Ernst Kleemann, Wiesbaden. FI 7/1984, Eberswalde
- Esperanto-terminoj por la forstscienco. (Espranto-Termini für die Forstwissenschaft.) Bulgara Esperantisto (BE), 10/1986. p. 14, Sofio. **Mitautoren:** Simon, K.-H.; Marinov, B. D.
- Pri kelkaj spertoj, akiritaj dum la ellaborado de Esperanto-terminoj por la forstscienco. (Über einige bei der Erarbeitung von forstwissenschaftlichen Esperanto-Termini gewonnenen Erfahrungen.), FI 14/1986, Eberswalde. **Mitautoren:** Simon, K.-H.; Marinov, B. D.
- Pri la tekstprilaborado kaj komunikado dum la preparo de multlingva forstfaka vortaro. (Zur Textbearbeitung und Kommunikation bei der Vorbereitung eines multilingualen Forstfachwörterbuches.), FI 20/1989, Eberswalde. **Mitautoren:** Simon, K.-H., Steinert, U.
- Vorschlag zur Klassifizierung von Termini auf dem Gebiet des Forstwesens. Beiträge f. die Forstwirtschaft, 24(1990)3, p. 146-147. **Mitautoren:** Simon, K.-H., Pluquet, E.
- Ĉefaj principoj por la determino de esperantaj forst-terminoj ĝenerale kaj simpligita terminofarado ĉe substantivaj terminoj speciale. (Hauptprinzipien für die Bestimmung forstlicher Termini in Esperanto im Allgemeinen und vereinfachte Terminusbildung bei substantivischen Termini im Besonderen.), FI 26/1992, Eberswalde
- Ein mehrsprachiges Forstwörterbuch für die Forstwirtschaft. AFZ 8/1993, p. 414, Stuttgart. **Mitautor:** Simon, Karl-Hermann
- Hauptprinzipien für die Auswahl forstlicher Termini in Esperanto und der Aspekt der freien Wortbildung bei zusammengesetzten substantivischen Termini, FI 32/1995, Eberswalde. (deutsch und Esperanto)
- Portmann, Doug: La mezurvortoj en la faklingvo de Esperanto: Kiel forigi la »ec«-malsanon. **Resumo** por la laboro de la Terminologia Komisiono de IFRE (TKI). FI 35/1997, Eberswalde
- Propono por la skriba formo de esperantlingvaj plantonomoj, speciale de arboj kaj arbedoj. (Vorschlag zur Schreibweise esperantosprachiger Pflanzennamen, speziell von Bäumen und Sträuchern.) FI 38/1998, Eberswalde
- „Lexicon silvestre“. Leksikono kaj Vortaro kun Novaj Spertoj. („LS“ Ein Lexikon und Wörterbuch mit neuen Erfahrungen.) Scienca Revuo, 49 (1998)(1), p. 11-17, Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)
- Prinzipien des multilingualen Forstwörterbuches “Lexicon silvestre” mit Tabellen. Interlinguistische Informationen, Mitteilungsblatt der Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL), Beiheft 5/1999, p. 40-51 und Beiheft 10/2003, p. 110-131. **Mitautor:** Simon, K.-H.
- Nomaro de la forsta ligneca flaŭro en Eŭropo. (Scienc-latina, Esperanta, Germana). (Nomenklatur der forstlichen Gehölzflora Europas.) Förderverein “Lexicon silvestre” e.V., 1-a eldono (1. Aufl.) 1999, 2-a eldono (2. Aufl.) 2000, Eberswalde, 174 p.
- Spertoj sur la vojo al terminologia prilaborado de la forstfaka lingvo. Scienca Revuo, 51 (2000)(2), ISAE. **Mitautor:** Simon, K-H
- Erfahrungen bei der terminologischen Bearbeitung der forstlichen Fachsprache. (*Erweiterte vorherige Publikation in Deutsch*) Mitteilungsblatt der GIL, Beiheft 6/2001, p.146-157. **Mitautor:** Simon, K.-H.
- Erfahrungen mit Normtermini in Esperanto (Bericht der Terminologischen Kommission von IFRE /TKI/). Deutsch und Esperanto. FI 44/2001, Eberswalde. **Mitautoren:** Marinov, B. D.; Simon, K.-H.
- Nomenclatura Florae lignae silvestris Europae. (Nomenklatur der forstlichen Gehölzflora Europas).(Normaro /Scienc-latina – Esperanta – Germana – Angla – Franca / 3-a eldono / 3. Auflage). Förderverein “Lexicon silvestre” e.V., 2009, Eberswalde, 225 p.

2 Traduko de forstaj fakartikoloj

- VAVILOV, S.V., MOSCHKALEV, A.G.: Der gegenwärtige Stand der Forsteinrichtung in der Sowjeunion. Innerbetriebliche Mitteilungen des VEB Forsteinrichtung Potsdam, 1984. (La nuntempa stato de la forstaranĝo en Sovetunio.) 1984, skribmaŝine, 36 p. nepublikigita /unveröff./)
- WEIGER, H: Mit Düngung ist der Wald nicht zu retten. Natur und Umwelt, 1/1984, Ausgabe für Bayern, p. 14 (Helpe de sterkado oni ne povas savi la arbaron. TST 2/1987, Pekino, p. 23-24 /auch in Chinesisch/ ankaŭ ĉinlingve)
- SCHÜTT, P.: Krankheit mit Fragezeichen. Natur und Umwelt, 1/1983, Ausgabe für Bayern, p. 10-11 (Malsano kun demandosigno. TST, 4/1987, Pekino, p. 16-18 /auch in Chinesisch/ ankaŭ ĉinlingve)
- KNABE. W.: Zur Waldentwicklung und zum IUFRO-Kongreß 1986. AFZ 24/1987, Stuttgart, p. 621-622 (Pri la arbardisvolviĝo kaj IUFRO-kongreso 1986. FI, 19/1988, Eberswalde, 5 p.)
- GEROLD, D.: Waldentwicklung und betriebliche Strategien in SO₂ – Immissionsgebieten. In: Proceedings Centennial, Interdivisional and Divisional Sessions of Division 6 and 4, Berlin-Eberswalde 31.08.-04.09.1992, p. 39-46.
- (Arbardisvolviĝo kaj strategioj de forstaj entreprenoj en regionoj de SO₂-imisioj. FI 29/1994, Eberswalde 6 p.)
- PETROV, A.: Russlands Mitarbeit in der IUFRO – Wirklichkeit und Vorstellungen. Der Wald 8/1992, Berlin, p. 284-285 (Kunlaboro de Rusio en IUFRO – realo kaj imagoj. FI 31/1995, Eberswalde, 3 p.)
- KLEIN, E. Drehwuchs und Spannrückigkeit bei der Fichte. AFZ 18/1991, Stuttgart, p. 945-947 (Spirala kresko kaj trunk-ondeco de Piceo. FI 31/1995, Eberswalde, 5 p.)

3. Neforstfakaj publikaĵoj

3.1 Literaturo (Proso kaj Liriko)

- Arbaro. Erzählung in Original-Esperanto. (Dritter Preis im internationalen Esperanto-Literaturwettbewerb der Zeitschrift „Bulgara Esperantisto“, 1980)
- Amo kaj Doloro. Provoj de lirika versado, originalaj kaj tradukitaj lirikaĵoj, 1978 – 1993. (*Liebe und Schmerz*. Versuche lyrischer Dichtung, originale und übersetzte lyrische Gedichte, 1978) Nepubl./unveröff.
- Giono, Jean: Un caractère. (Original Französisch. Übertagen aus der deutschen Übersetzung von Walter Tappolet „*Der Mann mit den Bäumen*“ ins Esperanto unter den Titel „*Unu karaktero*“ /La paŝtisto, plantinta arbojn/, 1993)
- Die Zaubergeige und andere Märchen. Werbeservice & Notensatz S. Fischer, Hildburghausen 2010

3.2 Kompozicioj

- Franz Schubert – ein Wiener Musikgenie. Zur Erinnerung anlässlich seines 200. Geburtstages. Südthüringer Rundschau Nr. 23, 25, 28, 29, 30, 7/97 (V Teile)
- Musikdirektor Adolf Geuther zum Gedenken. (Zum 50. Sterbetag des Hildburghäuser Ehrenbürgers). Südthüringer Rundschau Nr. 40, Jahrg. 8/98, p. 12-13
- Carl Maria von Weber. Eine Lebensskizze. kleines Universum , Herausgeber: Stadtmuseum Hildburghausen, 1/2001, p. 76-99, Offizin Hildburghausen
- Hildburghäuser Musiker. Ein Beitrag zur Musikgeschichte der Stadt Hildburghausen. Schriften zur Geschichte der Stadt Hildburghausen, Bd. 4., Frankenschwelle KG Hildburghausen 2003, 419 p., 119 Abb.

- Georg Friedrich Händel und Hugo Riemann – zwei musikalische Genies. (Zum 250. Todestag von G. F. Händel und 160. Geburtstag und gleichzeitig 90. Todestag des berühmten Musikwissenschaftlers Hugo Riemann). Freies Wort, Unabhängige Thüringer Tageszeitung, 16.. April 2009 (Teil I, p. 18) und 23. April 2009 (Teil II, p. 18)
- Südthüringer Heimat. Lied für vierstimmigen Männerchor / vierstimmigen gemischten Chor. (1992). Uraufführung Männerchor: 21.11.2009 in Eisfeld. Werbeservice & Notensatz S. Fischer, Hildburghausen, 2008
- Concertino für Trompete und Streichorchester. (1995). Uraufführung: 30.04.2005 in Hildburghausen. MEC, 2005
- Vaterunser für vierstimmig gemischten Chor und Orchester. (1996). Werbeservice & Notensatz S. Fischer, Hildburghausen, 2008
- Trauermusik für Orchester und Stimme. (1998). (Für meinen geliebten und unvergessenen Sohn Dietmar). Werbeservice & Notensatz S. Fischer, Hildburghausen, 2008
- Geistliche Gesänge. Zyklus in fünf Teilen. (1998-2000). Unveröff.
- Epitaph für Jesus, für Soloviola und Streichorchester. (2001). MEC, 2006
- Sinfonietta für Kammerorchester. (2008). Werbeservice & Notensatz S. Fischer, Hildburghausen, 2008
- Wiegenlied für Sopran und Klavier. (2009). (Für meinen Enkel Damian Piotr). Werbeservice & Notensatz S. Fischer, Hildburghausen, 2009
- Abend. Lied für Alt und Klavier. In memoriam Manfred Renner. Werbeservice & Notensatz S. Fischer, Hildburghausen, 2010

Principoj de la multlingva forstfaka vortaro “Lexicon silvestre” kun Esperanto-parto¹

de Karl-Hermann Simon kaj Ingward Ullrich

0 Enkonduko

Motivo por la ellaborado de “Lexicon silvestre” (Ls) estis la bezono de forstfaka vortaro en Esperanto. Forstistoj de diferencaj gepatraj lingvoj konstatis tian bezonon en la 70aj jaroj. Aldoniĝis malkontenteco de la uzantoj de forstfakaj vortaroj, kiuj – pro la ambigueco de multaj forstfakaj terminoj – ne ĉiukaze povis trovi la adekvatan tradukon, ĉar klarigoj pri terminoj ofte mankas en multlingvaj vortaroj. Estis la celo de ĉiuj pripensadoj pri la evoluigo de “Lexicon silvestre”, kontribui al la interkomunikiĝo de diverslingvaj fakuloj sur la kampo de la forsta fako kaj de najbaraj fakaj kampoj. Estas intencite, facile disponigi al la uzantoj plej eble multajn informojn pri divers-specaj uzoceloj.

Ĉi-loke estu prezentataj la principoj, fiksantaj la laboron rilate tiun verkon kaj kiuj kolektis internacia grupo de pleje forstistoj ekde 1981. Kaŭzo pri tio estas la 100a naskiĝtago de Eugen WÜSTER je la 10a de oktobro 1998. Sen lia fundamenta agado pri la ĝenerala terminologia instruo kaj terminologia leksikografio la ekesto de Ls tiuforme ne eblis².

¹ aperis en: Ulrich Becker (1999, Red): *Interlinguistik und Lexikografie. Interlinguistische Informationen, Beiheft 5*, Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 40-51 (R).

² Tiu kontribuajo estis origine ellaborataj por volumo de konferenco “ProCom’98. Internacia konferenco Professional Communication and Knowledge Transfer (Vieno, 24-26 aŭgusto 1998)”. En tiu konferenco K.-H. Simon en la sekcio 3 “Terminologia Scienco kaj Planlingvoj” estis prezentita la principojn pri la ellaborado de “Lexicon silvestre”. La volumo pri la konferenco neniam aperis, sed estis publikigita de Asocio pri Interlingvistiko, komparu ankaŭ Simon/Ullrich 2003 (R).

1 Principoj

Unue estas prezentataj tiuj laborprincipoj de la Ls-projekto, kiuj povas validi ĝenerale por similaj multlingvaj projektoj, ekz. la multlingva Fervojfaka Vortaro (vd. HOFFMANN 1998).

1.1 Lingvoj

Samrajteco de ĉiuj etnolingvoj.

Tiu principo estas postulata ankaŭ en internaciaj organizaĵoj kiel UN. Sed klopodante realigi tiun principon, oni renkontas ekonomiajn obstaklojn. Malantaŭ ili kaŝas sin egoismaj interesoj de la ekonomie kaj politike potencaj ŝtatoj. Dekomence de sia laboro la aŭtoroj klopodis principe ne escepti iu ajn lingvon en Ls. Do, kadre de niaj fortoj, ĉiuj disponeblaj fontoj estas utiligataj paŝon post paŝo ĉe la kolektado de terminoj. Sed la sfero de niaj klopodoj estas ekonomie limigita. Nuntempe ni ne povas havigi multekostan softvaron por la registrado de terminoj de neeŭropaj lingvoj. Sed jam ĉe la prezentado de prov-volumo kun 24 lingvoj³ en la jaro 1992 ni klopodis per nomado de la verko kaj la aranĝo de la lingvoj kaj terminoj demonstri la samrajtecon de lingvoj. Kiel titolon de la verko ni elektis la malnovan lingvon de la scienco, la latinan. La sinsekvo de la lingvoj estas ordigata laŭ DK-indekso de ISO-Normo 939 :1988.

En Ls montriĝos la samrajteco de ĉiuj lingvoj tiomgrade kiel ni sukcesas indiki la nociodifinojn ankaŭ por pli malmulte disvastiĝintaj lingvoj. Tute konscie ni metas unualoke tiun principon, kiu trapenetas la interkulturan aspekton de nia verko. Ankaŭ laŭ la statuto de "Patrona Asocio 'Lexicon silvestre' r.a." (vd. 2.2 "Patrona Asocio"), protektanto de la Ls-projekto, tiu principo estas unuaranga.

1.2 Rilatoj nocio – termino

Eliropunkto pri la elektado de termino estas la nocio.

Laŭ WÜSTER (1979) (vd. ankaŭ WERNER 1986, SUONUUTI 1997) ĉe terminologia prilaborado oni eliru de nocioj. Nocio estas pens-unuo, kreita per tiaj karakterizaĵoj, kiujn oni povas atribui al objekto aŭ al klaso da objektoj. Nocio ne estas ligata al specifa lingvo. Termino estas la indiko de nocio en faklingvo per lingva esprimo. Ĉiu nocio jam ĉe sia ekesto iel estas nomata, por povi interkomunikiĝi en komunumo. Tiu proceso ofte instinkte okazas kaj tial forpuŝas la intuicion, ke la nocio estas primara kaj ties signado (karakterizaĵo) – en faklingvo nomita termino – sekundara. Aldone, karakterizaĵo ofte havas individuan vivon, aparte de nocioenhavo.

Tiuj faktoj konceptebligas, ke multaj fakuloj, al kiuj ĝis nun mankas ekkonojn pri la terminologia scienco, malfacile komprenas la fundamentan laborprinzipon, aplikitan en Ls. Nur tiu, kiu enigis en sian menson, ke nocio estas la unuiga, interliga ĉenero, plene engaĝos sin. Konscie uzante tiun principan ekkonon, ni vidas la ŝancon krei novan kvaliton de forstfaka vortaro. Ni scias, ke aliaj fakoj, precipe teknik-naturscience orientiĝintaj (elektroniko, kemio), sur tiu kampo plenumas pioniran rolon. Ekonomiaj sferoj, do grave socie karakterizitaj, ĉi-rilate havas pli grandan penon.

Ni devas konsideri la argumenton, ke ekzistas okazoj, en kiuj en kelkaj lingvoj la tute sama termino estas uzata, sed ĝi ne ĉiam signas la tute saman nocioenhavon. El tio sekvas, ke nocioj tamen ne samrangas trans lingvolimojn. Pri tio oni povas rimarki: Ĉi-okaze vere ekzistas diferencaj nocioj, kvankam tre parencaj. Oni komprenu ilin kiel specialajn nociojn. Sole tiel oni povas eviti miskomprenojn.

1.3 Kolektiva laborado

Inkludo de specialistoj de diversaj sciencobranĉoj.

Estas memkompreneble, ke ni – parolantaj la germanan gepatran lingvon – en Eberswalde ne povas respondeci pri alialingvaj Ls-versioj. Rilate al tio laboras forstfakuloj de la koncerna gepatra lingvoscio. Rilate forstsciencan samopinion pri nocioj kaj ties difino ni serĉis kaj trovis la kunlaboradon de ĉirkaŭ 50 fakbranĉaj specialistoj. Multaj el ili loĝas en Eberswalde,

³ Esperanto, angla, germana, nederlanda, norvega, sveda, franca, itala, rumana, hispana, portugala, rusa, ukraina, pola, ĉeĥa, slovak, serbo-kroata, bulgara, latva, turka, hungara, finna, vjetnama, japana (R).

centro de la forstsciencoj. Pro tio oftaj konsultadoj estas facile realigeblaj. Sed ankaŭ ĉe ni validas la parolturno: “Du fakuloj – tri opinioj”.

2.1 Fluo de informoj

Garantio de fluo de informoj kaj konstanta interkomunikiĝo de la aŭtoraro.

Tiu ĉi tasko postulas neevideblan tempokonsuman elspezon flanke de la centralo en Eberswalde. Jam 1982 ni komencis eldoni la bultenon “*Forstista Informilo*” (*FI*), determinita por la kunlaborantaro. La esperantlingva titolo devenas de la kunlaborantoj, kiuj tiam estis nur esperantistoj. Dum la sekvaj jaroj ankaŭ aliaj neesperantlingvaj forstistoj aliĝis kiel kunlaborantoj. Tial necesas, ke ekde kelkaj jaroj ni aperigas “*FI*” dufoje dum la jaro ankaŭ german-, angla- kaj franclingve. Ekde 1992 ĉiujare en Eberswalde okazas dum la aŭtuno kunvenoj kun prelegoj kaj vespero en societema rondo. Bedaŭrinde dum la jaroj malpli da interesiĝantoj povas partopreni en tiuj kunvenoj pro manko da personaj financaj rimedoj, precipe ĉar ankaŭ publikaj subtenaj financaj rimedoj por preleghonorarioj ne plu estas donataj.

La financajn elspezojn – kreskantajn laŭnombre de kunlaborantoj – rilate al poŝtaj kontaktoj ni povis minimumigi lastatempe pro senkosta uzo de la interreta konekto de Forstfaka Altlernejo Eberswalde.

1.5 Fundamentaj kategorioj

La determino de nocio komenciĝu per ordigo laŭ fundamentaj kategorioj.

WÜSTER proponis klasifiki la nociojn ĉe terminologia laboro. Ni precezigis tiun proponon per la kreo de ok fundamentaj kategorioj. Jen ili estas:

1. Persono
2. Objekto
3. Ilo, instrumento, maŝino
4. Loko, ejo, spaco, areo
5. Eco, stato, maniero
6. Abstraktaĵo
7. Ago, fariĝo
8. Mezuro, indiko pri valoro, kvanto.

Aldone estas indikataj la gramatika formo de la nocio, nome: Substantivo, adjektivo, verbo kaj pluralo.

Tiu ĉi klasifiko pruvis sin tre utila. Ĝi ankaŭ estas fiksata per koncernaj ciferoj en la kaplinio de ĉiu nucia artiklo (vd. tabeloj 1 – 3). Tio helpas al fremdlingvaj kunlaborantoj malpliigi miskomprenojn pri la nocioenhavo, precipe de plursencaj terminoj. Ni spertis, ke apenaŭ sukcesas tute klara kaj certagrada unueca formuladon sen tia klasifikado de nocioj laŭ fundamentaj kategorioj.

1.6 FDCE-numero

Al ĉiu nocio estu aldonata aparta nombro.

Tiu principo diferencas de la praktiko en “The Multilingual Forestry Terminology Series” (FORD-ROBERTSON, 1971) kaj propono de YERKE (1983). La unua verko estis intencita kiel baza konsultlibro pri la plibonigo de la internacia interkomunikiĝo de forstistoj. Ĝi estis planita en la sesdekaj jaroj de la FAO/IUFRO-komitato⁴. La verko de FORD-ROBERTSON ĝis nun estas eldonita nur por malmultaj lingvoj. Ĝi eliras de anglaj terminoj kun klarigoj.

La numeroj de la terminoj servas kiel ĉenero inter la unuopaj lingvoj. Ankaŭ YERKE en Usono proponis numeradon de la terminoj en plurlingva vortaro.

En Ls oni eliras de nocioj (kaj ne de terminoj!). Tial estas logike ne numeri terminojn, sed nociojn. Laŭ propono de SIMON k. a. (1990) estas aldonata al ĉiu nocio aparta, tielnomata FDCE-numero. Ĝi baziĝas sur la forsta decimala klasifiko aŭ ankaŭ ĝenerale decimala klasifiko pri la registrado de literaturaj enhavoj. La litero E signifas Eberswalde, vd. tab. 1-3)

⁴ International Union of Forestry Research Organization – Internacia Asocio de Forstfakaj Esplorinstitutoj

1.7 Laŭsistema aranĝo

La aranĝo de nocioartikoloj ĉe la libroformo okazu laŭsisteme.

La apliko de la supre nomita FDCE-numero permesas, ĉiutempe ordigi la nociojn laŭ ilia nocioenhavo. Tio estas duoble avantaĝa: Dum la prilaborado de Ls, oni povas tre rapide kontroli, ĉu iu ajn nocio jam estas prilaborita. Terminoj ne ĉiam estas konvenaj por tia serĉado pro diferencaj nomadoj de nocioj. Aliflanke printformoj de Ls sen malfacilaĵoj povas ricevi laŭenhavon ordigitan strukturon.

1.8 Difinado de nocio

Oni difinu ĉiun nocion.

Ŝajnas, ke tiu principo unuavide estas memkomprenebla. Sed kelkaj kunlaborantoj kontraŭdiras tion. Ekzistas okazoj, kiam plurvorta termino jam klarigas la nocioenhavon kaj pro tio ŝajnas fakte nenecesa ripeto de la vortoj. Sed la ripeto necesas, eĉ per la samaj vortoj, ĉar sole en difino eblas referencoj al aliaj difinoj kaj alialingvaj prilaborantoj precize ekkonu, kion ili traduku en alian lingvon. Tie verŝajne apenaŭ ekzistas tiu ĉi konformeco de la laŭvorta teksto de nocio kun la laŭvorta teksto de termino. Plia kaŭzo estas, ke malplena spaco en la datenbanko povas sekvigi malfacilaĵojn al la uzantoj.

1.9 Interplektoj de nocioj

Klare montri la interplektojn de la nokia sfero.

Kadre de terminologia prilaborado de faklingvo la formado de nocioj sistemoj estas grava paŝo. Komence de la laborado pri Ls la prilaborantoj havis klaran ideon pri tio, ke internaciaj fakgrupoj – kiel tiuj de IUFRO – faru la fundamentajn paŝojn rilate al terminologia prilaborado de farstfaka lingvo, antaŭ ol laborgrupoj pri la unuopaj lingvoj povas fiksi la interkonsentajn terminojn – normterminojn.

Ls prezentu nur apogon por tiu estonta prilaborado, por ke kolektado de ekzistantaj terminoj pri la unuopaj nocioj okazas. Ankaŭ ŝajnis, superi la kadron de Ls, en ĝi listigi nociojn sistemojn. Tial al ni ŝajnis grava, jam konatebligi en la (provizoraj) difinoj la nociojn interplektojn per referencoj al la koncernaj nocioj. Sed tio okazas nur tiom amplekse, kiel necesas por nuntempaj uzantoj de multlingva vortaro.

1.10 Gvidlingvo

Kiel gvidlingvo dum la prilaborado servu la plej taŭga lingvo.

Dum ellaborado de multlingva verko oni decida pri la laborlingvo (interliga lingvo). Tiu problemo ne koncernas la uzantojn. Ili konfidas al findinda interpreto de nocioj fare de la aŭtoroj. La problemo pri gvidlingvo gravas sole por la aŭtoroj. Jam en la okdekaj jaroj oni decidis pri tiu ĉi problemo. La ĝusteco de la decido poste estis konfirmata per la spertoj dum la plua laboro.

Kiel gvidlingvo ĉi tiu lingvo servu, kiu permesas formuli difinon plej esenca kaj trafa. **Tia estas la planlingvo Esperanto**⁵, la sola lingvoprojekto, kiu evoluis al "vivanta" lingvo. La strukturo de tiu lingvo permesas grandskalan povon da unusignifa esprimkapablo. Pro tio ĝi estas precipe taŭga kiel lingvo de la scienco. Jam WÜSTER (1931) kaj i.a. ankaŭ D. BLANKE (1982) kaj SCHUBERT (1993) pruvis tion. Rilate al la laboro pri Ls oni formulu la jenan: "Kiel gvidlingvo dum la prilaborado servu Esperanto." Tio kondiĉas plenan lingvoscion de Esperanto flanke de la decidaj kunlaborantoj pri tia projekto. Ni mem, parolantaj la germanan gepatran lingvon, kelkfoje devas konsulti la esperantlingvan difinon, por konvinkiĝi pri la klareco de la germanlingva difino.

1.11 Uzado de Lexicon silvestre

Celi facilan uzadon por la uzantoj

Estas celo de la Ls-aŭtoroj, disponigi maksimumajn informojn al la uzantoj. La lingve interesigantoj kaj ankaŭ la interesigantoj pri la nocioenhavo ricevas komfortan aliron al

⁵ akcentita de la tradukinto I.U.

parencaj (sinonimaj) terminoj kaj nocioj per laŭenhave ordigita aranĝo de la nocioartikoloj ĉe la libroformo. Por facilkompreneble aranĝi por la librouzantoj la ligo inter la lingvaj versioj, la nocioartikoloj estas provizitaj ankaŭ per kuranta kvarcifera numero krom la naŭcifera FDCE-numero (vd. punkto 1.6). En la nociodifinoj estas aldonitaj al terminoj, kiuj ne premisas la ekzaktan komprenon de interesigantaj laikjo, referencoj al la apartenanta difino per kvarcifera kuranta numero.

Fare de la referencoj oni povas formuli koncize la tekstston. Tial fakuloj povas legi ĝin tempoŝara. Inter rondaj krampoj estas metitaj ĉi tiuj partoj de difino, kiuj ne grave necesas, sed plifaciligas la komprenon de la uzantoj.

Ĉiu volumo entenas indekson de la kapvortoj laŭalfabete ordigitaj. Tie konstante estas referencata al la plej favora termino de nocio. Polivalentaj terminoj estas indikataj sub pluraj kapvortoj. Ekde "Secunda pars", la dua volumo de Ls, la indeksoj ankaŭ entenas la kapvortojn de la antaŭaj volumoj. Tial uzantoj bezonas uzi nur la indekson de la laste publikigita volumo.

Atentigoj pri teritorioj de disvastiĝo de terminoj kaj informoj pri la genro de substantivoj estas indikitaj en la ĉefa parto.

1.12 Rekomendoj

La uzantoj ricevu rekomendon, kiun terminon ili uzu por determinita nocio.

Por trafa elektado de la plej rekomendinda termino ne ĉiam sufiĉas la konvena nokia elekto helpe de citita difino. Okazas, ke pri nokia artikolo estas nomitaj pli ol 20 terminoj. Terminoj, estantaj nur preskaŭ sinonimoj de la difino aŭ terminoj, uzataj en pli vasta aŭ pli malvasta signifo ol la difino, estas indikataj per specialaj signoj (vd. tabelo 3 k. 4). Unualoke ĉiam troviĝas la plej rekomendinda termino. Evitendaj terminoj estas signitaj per krisigno.

La realigo de ĉi tiu principo ne estas libera de subjektiva opinio de la prilaborantoj. Tial tiu indiko estas elmetata ankaŭ al kritiko. Tamen ni ne rezignas pri tio, interese de la uzantoj. Ne malmultaj uzantoj, ĉefe tradukistoj, ĉe la elektado de la plej rekomendinda termino bezonas la proponon de fakuloj, kiuj almenaŭ certagrade okupiĝis pri la tematiko. La uzantoj povas atingi la elektadon de la ĝusta nocio sole per la respektiva kunteksto.

1.13 Datenbanko

Registrado de ĉiuj gravaj informoj en datenbanko.

Elektronika datenbanko nuntempe estas celtaŭga helpilo por registri, kompletigi, korekti la multon de la informoj pri la registrado de nocioj kaj disponigi ilin por aŭtoroj kaj uzantoj. Ju pli da postuloj pri datenbanko, des pli komplika la datenbankaj produktoj. Estas grave, dekomence klare doni strukturon al daten-enigoj kaj plani apartan daten-fakon por ĉiuspecaj indikoj. Oni ankaŭ dekomence registru intereso-marĝenajn indikojn, kiel datenoj pri fontoj kaj ŝanĝoj (transformadoj), pri kiuj oni ne tutcerte scias rilate ilian estontan efektivan bezonon.

1.14 Eldonoformo

Disponigo de la verko kaj print- kaj elektronikforme.

La registrado de datenoj en datenbanko permesas, poste fari diversajn eldonoformojn de Ls. La Ls-aŭtoroj planis dekomence kaj la libroformon kaj ankaŭ la elektronikajn formojn. Konforme al la evoluo dum la lastaj jaroj oni ŝanĝis la diskedan formon favore al la laboro pri Ls al CD-ROM.

1.15 Normoj

Utiligo de ISO-kaj naciaj normoj laŭ disponebleco kiel bazaj rimedoj.

Oni rigardu ekzistantajn normojn, enhavantajn determinojn de nocioj kaj terminojn, kiel precipe valoraj bazaj rimedoj por la laboro pri Ls. Bedaŭrinde ilia utiligo parte bezonas konsiderindajn elspezojn. Normoj, ekestantaj fare de agado de internaciaj komisionoj, kiel ISO-normoj, meritas specialan atenton kaj gravecon.

1.16 Amplekso

La uzantoj povu informiĝi pri la nocioenhavo(j) de ĉiuj terminoj, ekzistantaj en la literaturo de la lasta jarcento.

Tiun ĉi principon, tiun intencon, oni ĉiukaze celu konstante ĉe fundamenta verko pro pli posta faklingva prilaborado. Tia rezulto de kolektado donas al la uzantoj la eblecon, trovi helpon ankaŭ ĉe komplikaj problemoj pri nocioj aŭ pri tradukado en koncerna fako. Komparante aliajn multlingvajn fakvortarojn, eble kelkaj uzantoj rimarkas la mankon da nomoj de arbaraj bestoj kaj plantoj. Dekomence la iniciatintoj de la Ls-projekto rezignis pri mencio de aĵoj, por kiuj ekzistas internacie akceptitaj nomenklaturetoj, ebligantaj unusencan internacian interkomunikiĝon.

(daŭrigota en FI 62/2012)

Helpu al Lexicon silvestre per viaj mondonacoj !

Lexicon silvestre kreiĝas per la iniciativo de Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.a. Ĝi estas ĉefe financiata helpe de mondonacoj.

En Germanio

Sparkasse Barnim in Eberswalde
BLZ: 170 520 00
Kontonumero: 390 108 81 04

Internacie:

IBAN: DE25 1705 2000 390 108 81 04
BIC-/SWIFT-CODE: WELA DE D1 GZE

Dankon pro via subteno!

PRES-INDIKAĴOJ

Kontaktadreso:	Eldonisto/Redaktoro:
Förderverein „Lexicon silvestre“ e.V. Hochschule für nachhaltige Entwicklung Eberswalde Dr. Bernhard Götz Am Zainhammer 5 D-16225 Eberswalde Tel.: +49-3334-65 74 77 Fax: +49-3334-65 74 78 Email: kontakt@lexicon-silvestre.de Homepage: www.lexicon-silvestre.de	Patrona Asocio „Lexicon silvestre“ e.V. Stefan Panka Joachimsthaler Str. 15a D-16230 Britz Tel: +49-3334-255 228 Email: s.panka@lexicon-silvestre.de

Traduko de IF 61/2011 el la germana: Ingward Ullrich

Librooferto

Gb bindita
 Ringh ringokajero
 Pb kartonita libro

ISBN	Libro bindo	Jaro de eld.	Titolo	Prezo
3-931 262 18-9	(Gb)	1997	Lexicon silvestre, Prima pars Šumarski rječnik, Hrvatski dio (I hr) a definicijama, 96 p. (Kroatische Ausgabe, 1. Teil)	15,00 €
3-931 262 20-0	(Gb)	1997	Lexicon silvestre, Prima pars Dictionary of Forest Affairs, English Version (I/en/2) with Definitions. X, 125 p. (Englische Ausgabe, 1. Teil)	15,00 €
3-931 262 22-7	(Gb)	1997	Lexicon silvestre, Prima pars Ormancılık Terimleri Sözlüğü, Türkçe Bölüm (I tr) Açıklamalı, 58 p. (Türkische Ausgabe, 1. Teil)	10,00 €
3-931 262 30-8	(Gb)	1998	Lexicon silvestre, Secunda pars Vortaro de forsta fako Esperantlingva versio (II/eo/1) kun difinoj. X, 82 p. (Esperanto-Ausgabe, 2. Teil)	10,00 €
3-931 262 32-4	(Gb)	1999	Lexicon silvestre, Secunda pars Dictionnaire de foresterie, Version française (II fr) avec des definitions, 120 p. (Französische Ausgabe, 2. Teil)	15,00 €
3-931 262 34-0	(Gb)	1999	Lexicon silvestre, Tertia pars Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (III/de/1) mit Definitionen. X, 144 p. (Deutsche Ausgabe, 3. Teil)	15,00 €
3-931 262 35-9	(Ringh)	1999	Lexicon silvestre, Tertia pars Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (III/de/1) mit Definitionen. X, 144 p. (Deutsche Ausgabe, 3. Teil)	13,00 €
3-931 262 36-7	(Gb)	1999	Lexicon silvestre, Tertia pars Vortaro de forsta fako Esperantlingva versio (III/eo/1) kun difinoj. X, 97 p. (Esperanto-Ausgabe, 3. Teil)	15,00 €
3-931 262 59-6	(Gb)	2000	Lexicon silvestre, Prima pars (Ls) Esperantlingva versio (I/eo/3) kun difinoj. X, 107 p. (Esperanto-Ausgabe, 1. Teil, 3. Bearbeitung)	15,00 €
3-931 262 60-X	(Gb)	2001	Lexicon silvestre, Secunda pars Dictionary of Forest Affairs, English Version (II/en/1) with Definitions. X, 157 p. (Englische Ausgabe, 2. Teil)	20,00 €
3-931 262 60-X	(Ringh)	2001	Lexicon silvestre, Secunda pars Dictionary of Forest Affairs, English Version (II/en/1) with Definitions. X, 157 p. (Englische Ausgabe, 2. Teil)	20,00 €
3-931 262 62-6	(Gb)	2001	Lexicon silvestre, Quinta pars Vortaro de forsta fako Esperantlingva versio (V/eo/1) kun difinoj. X, 115 p. (Esperanto-Ausgabe, 5. Teil)	15,00 €
3-931 262 67-7	(Gb)	2002	Lexicon silvestre, Prima pars Gozdarski slovar, Slovenski verze (I/sl/1) z definicijama, 61 p. (Slowenische Ausgabe, 1. Teil)	15,00 €
3-931 262 72-3	(Gb)	2002	Lexicon silvestre, Quarta pars Dictionnaire de foresterie, Version française (IV/fr/1) avec des définitions, 167 p. (Französische Ausgabe, 4. Teil)	20,00 €
3-931 262 74-X	(Pb)	2003	Lexicon silvestre, Prima pars Fjalor i pylltarise Versioni shqip (I/sq/1) me definicionet, 76 p. (Albanische Ausgabe, 1. Teil)	15,00 €
3-931 262 78-2	(Gb)	2003	Lexicon silvestre, Sexta pars Vortaro de forsta fako, Esperantlingva versio (VI/eo/1) kun difinoj. X, 81 p. (Esperanto-Ausgabe, 6. Teil)	15,00 €
3-931 262 81-2	(Gb)	2003	Lexicon silvestre, Tertia pars Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (III/de/2) mit Definitionen. X, 151 p. (Deutsche Ausgabe, 3. Teil, 2. Bearbeitung)	20,00 €
3-931 262 83-9	(Gb)	2003	Lexicon silvestre, Quinta pars Dictionnaire de foresterie, Version française (V/fr/1) avec des définitions, 194 p. (Französische Ausgabe, 5. Teil)	20,00 €
3-931 262 66-2	(Gb)	2009	Lexicon silvestre, Prima pars, Wörterbuch des Forstwesens (Esperanto-Deutsch-Polnisch) 1025 definierte Begriffe in drei Sprachen mit einem Indexteil, 359 S.	27,50 €
3-931 262 67-9	(Gb)	2009	Nomenclatura Florae Lignae silvestris Europae (Deutsch, Englisch, Esperanto, Französisch, Latein), INGWARD ULLRICH	25,00 €
3-931 262 68-6	(Gb)	2010	Karl-Hermann Simon. Lexicon silvestre - Beiträge zum multilingualen Wörterbuch des Forstwesens. DETLEV BLANKE, STEFAN PANKA (Hrsg.)	10,00 €
3-931 262 69-3	(Gb)	2010	Lexicon silvestre, Prima pars, Wörterbuch des Forstwesens (Esperanto-Deutsch-Esperanto). 1025 definierte Begriffe in zwei Sprachen mit einem Indexteil, 300 S	26,00 €